# Esperanto-kulturo agnoskita kiel Nemateria Kultura Heredaĵo en Aŭstrio

Martin Gritsch

Post kiam la aŭstra Esperanto-komunumo investis multe da dediĉo kaj laboro en intensa kandidatiĝo, nun disponeblas la ĝojiga rezulto: la Aŭstria Unesko-Komisiono oficiale akceptis la Esperanto-kulturon en la nacian liston de Nemateria Kultura Heredaĵo. Per tiu ĉi paŝo oni agnoskas, ke la „Internacia Lingvo“ estas multe pli ol nur planlingvo – ĝi estas vivanta kulturo, kiu kreskis tra generacioj kaj estas profunde enradikiĝinta en la aŭstra historio.

Ĉio ekiris de la preparlaboroj por la venonta Universala Kongreso (UK) en Graz. La iniciatintoj, Ewald Schick kaj Martin Gritsch, volis uzi la ŝancon por direkti la publikan atenton al Esperanto jam antaŭ la kongreso. Ilia celo estis montri la profundan enradikiĝon de Esperanto en la aŭstra kulturo kaj doni signalon, kiu plue efikos longe post la evento en Graz. La sukceso de tiu ĉi plano ŝuldiĝas al bonega teama laboro: multaj membroj de la Esperanto-komunumo el Aŭstrio kaj eĉ el eksterlando kontribuis al tiu ĉi atingo.

## Kandidatiĝo plena de defioj

Por atingi la liston de Unesko oni devas superi altajn barilojn. La koro de nia kandidatiĝo estis ampleksa dosiero, kiu detale priskribas la historion de nia kulturo ekde la komenco ĝis hodiaŭ. Tamen ne sufiĉas nura retrospekto: ni devis konvinke argumenti, kial Esperanto estas signifa por la nuna socio kaj kiel ni kreive pludonas nian tradicion al la venontaj generacioj.




Informstando de Esperanto-Societo Stirio dum la 13-a Graz-a Lingvofesto la 26-an de septembro 2025. Foto: Esperanto-Societo Stirio




Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Bibiloteko
Foto: Aŭstria Nacia Bibiloteko

Plia decida faktoro estis la solida institucia bazo de Esperanto en Vieno: per la Kolekto por Planlingvoj de la Nacia Biblioteko kaj la Esperantomuzeo, Aŭstrio posedas mondskale unikan centron por la „Internacia Lingvo“.

Kroman impulson ni ricevis de faka flanko: internacie respektataj spertuloj subtenis la kandidatiĝon per sia kompetenteco. En siaj akompanaj leteroj, profesoro Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford), la diplomato kaj lingvopolitikisto Seán Ó Riain, kaj nia multjara kunbatalanto profesoro Michael Maitzen klarigas la specifecon de Esperanto. Ili klare montras, ke malantaŭ la konscie kreita lingvo troviĝas vivaj tradicioj kaj riĉa kulturo, kiuj ne malsuperas la kulturajn heredaĵojn de etnaj lingvoj.

## Ampleksa dokumentaro kaj vasta subteno

Decida faktoro por la pozitiva decido de la Komisiono estis la ampleksa dokumentaro kunsendita kun la kandidatiĝo. Apartan historian valoron reprezentis filmo pri la Universala Kongreso (UK) de 1970 en Vieno: la

registraĵoj montras, interalie, la malferman paroladon de la tiama Federacia Prezidento Franz Jonas en flua Esperanto. Tio estas impresa pruvo pri la multjara ŝtata agnosko kaj la profunda socia enradikiĝo de la lingvo en Aŭstrio. Por ligi la historion kun la nuntempo, la dosiero estis kompletigita per aktualaj materialoj, kiel ekzemple elsendo de ORF (aŭstra publika televido) pri la Esperantomuzeo, fotoj de nuntempaj varbagadoj kaj la plej novaj turismaj broŝuroj de Graz en Esperanto. Tiel oni montris, ke la Esperanto-komunumo hodiaŭ estas same vigla kaj signifa kiel en la pasinteco.

Por la Komisiono krome gravis, ke la kandidatiĝo ĝuu vastan subtenon de la bazo. Tion ni dokumentis per 74 konsentdeklaroj, kiuj klare montris al la Unesko-Komisiono, ke aktiva kaj sindediĉa komunumo subtenas la proponon.

### Konkurenca proceduro

Ke la akcepto en la liston tute ne certis, tion substrekas la rigora selektado de la nuna rundo. La Komisiono aplikis severan ekzamenan proceduron: el dek du prezentitaj dosieroj, nur kvar sukcesis atingi la statuson de kultura heredaĵo. La fakto, ke Esperanto povis sukcesi en tiel konkurenca kunteksto, atestas pri la kvalito de nia kandidatiĝo.

En sia argumentaro, la Komisiono precipe elstarigis la fortan komunumigan potencon de Esperanto. Kiel konscie kreita lingvo, ĝi sukcesas unike ligi homojn trans naciaj kaj kulturaj limoj. Decide por la akcepto estis la fakto, ke Esperanto estas multe pli ol nura komunikilo: La lingvo estas agnoskita kiel vivanta portanto de kulturaj valoroj, kiun la komunumo aktive flegas kaj praktikas en la ĉiutaga vivo.

### Perspektivoj kaj aldona valoro de la agnosko

Per tiu ĉi paŝo Aŭstrio fariĝas, post Pollando (2014) kaj Kroatio (2019), la tria lando en la mondo, kiu oficialigas tian agnoskon. Tio havas tujajn praktikajn efikojn: la movado gajnas pli grandan videblecon kaj, espereble, pli facilan aliron al subvencioj. Krome, la nova statuso faciligas pli intensan kunlaboron kun aliaj grupoj kiuj flegas la kulturan heredaĵon enlande kaj eksterlande.

La agnosko servas ankaŭ kiel fundamento por longtempa estonteca strategio. Ni planas intensigi la junularan agadon kaj plifortigi la kunlaboron kun lernejoj kaj universitatoj. Nia celo estas ne nur gardi la heredaĵon, sed certigi, ke ĝi restu alloga por novaj celgrupoj.

Kiel videbla signo de la agnosko, la aŭstra Esperanto-movado nun rajtas uzi specialan emblemon. La solena transdono de tiu ĉi simbolo estas planata kadre de la malferma ceremonio de la Universala Kongreso en Graz. Okazos historia premiero: unuafoje la kongreso gastos en lando, kiu ĵus antaŭe oficiale deklaris la Esperanto-kulturon protektinda nacia heredaĵo.

Immaterielles Kulturerbe in Österreich

Esperantokultur in Österreich / Esperanto-kulturo en Aŭstrio | aufgenommen in das Nationale Verzeichnis 2026

Krome, la retejo de la Aŭstria Unesko-komisiono dediĉas apartan kaj informriĉan paĝon al la Esperanto-kulturo en Aŭstrio. En ĝi disponeblas la kompleta kandidatiĝa dosiero (germane) kune kun la tri fakulaj akompanleteroj. Vi povas atingi la paĝon per la jena adreso: *https://mallonge.net/24t*.

Je internacia nivelo ĉi tiu sukceso povus servi kiel fundamento por estonta paŝo: la kandidatiĝo por la monda listo de Unesko pri Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

Ke tiu mejloŝtono atingiĝis danke al la engaĝiĝo de la bazo, estas por la esperantistaro en Aŭstrio kaj tra la tuta mondo signo de aprezo kaj potenca impulso por la estonteco.

Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe *redakcio@revuoesperanto.org* aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono. Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevitajn kaj nerecenzitajn oni fakturos al la ricevinto.

ALLAN KARDEC
VIRTUALA SPIRITISMA CENTRO
"Spiritismo rilatas kun ĉiuj branĉoj de la filozofio, de la metafiziko, de la psikologio kaj de la moralo; ĝi estas grandega kampo, kiun oni ne povas trairi en iaj kelke da horoj."
Regulaj, sesmonataj kursoj de spiritismo. Venu studadi en amika etoso!
NOVA GRUPO ĈIUN SESMONATON
Aliĝo kaj materialoj 100% senpagaj.
allankardeconline.com/globalkardec-eo
ALIĜU!